

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 5-a parto
Claude Gacond, 145-a radioprelego, 1966.07.13 & 1966.07.16

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas la raporton pri la Nica Kolokvo, kiu pasintjare studis, kiel Unuiĝinta Naciaro povus adaptiĝi al la hodiaŭa mondo. Ni ĉeestos hodiaŭ la duan labor-kunsidon.

A.- Sinjoro René-Jean Dupuy, profesoro en Nico, priskribis la funkciadon de la Internacia Justica Kortumo. El tiu sufiĉe faka raporto ni eltiros nur kelkajn konkludojn. En 1945, kiel jam en 1920, la registaroj ne akceptis submeti ĉiujn siajn internaciajn konfliktojn al supernacia juĝistaro.

Cl.- Malprogreso estas eĉ rimarkebla. Dum dudek jaroj la Justica Kortumo de Ligo de Nacioj okupiĝis pri 146 aferoj, dum en sama periodo la nuna Justica Kortumo de UN okupiĝis nur pri 40 aferoj. La registaroj preferas uzi perforton aŭ memnegocadon por solvi siajn konfliktojn.

A.- La Internacia Justica Kortumo estas statute malbone armita. Tial ĝi malfacile adaptiĝas al la nuna evoluo. Statutaj plibonigoj estas de longe proponataj, sed la registaroj ne facile akceptas vastiĝon de la kompetentecoj de tiu institucio supernacia.

Cl.- Ege raras la landoj, kiuj senrezerve promesis submeti siajn internaciajn konfliktojn al la Internacia Justica Kortumo. Ni menciuj ilin. En Ameriko troviĝas sep: Haitio, Honduraso, Kolombio, Nikaragvo, Panamo, Urugvajo kaj San-Domingo. En Eŭropo kvin: Danlando, Finnlando, Liĥtenŝtejno, Norvegio, kaj Svislando. En Azio du: Filipinoj kaj Formoza Ĉinio. En Afriko unu: Ugando. Entute ili estas nur 16.

A.- Pro premo de la publika opinio aliaj registaroj aliĝis al Internacia Justica Kortumo, sed ili metis tiom da kondiĉoj, ke tiu aliĝo estas nur simbola aŭ eĉ vere trompa. Ili scias, ke justico kaj nacia egoismo malfacile akordiĝas.

Cl.- Juro spegulas socian situacion. La internacia societo estas ankoraŭ tro heterogena por naski veran juran sistemon. Pledantoj sin turnas al juĝisto, nur kiam ili estas ligitaj per forta travivita solidareco. Hodiaŭ la nacioj apenaŭ eksentas, ke ekzistas internacia solidareco. La registaroj eĉ tre malfacile akceptas la ideon mem pri supernacia solidareco. Jure ili postvivis en feodala spiritostato.

A.- Tamen inter la epoko de Ligo de Nacioj kaj tiu de UN oni rimarkas progreson. En la nuna epoko la juristoj akordiĝas kun la registaroj por kalumni la Internacian Kortumon!

Cl.- La dua mondmilito, la armada konkuro, la disvolviĝo de la mondaj organizaĵoj tamen konvinkis novan generacion da juristoj pri la urĝa neceso starigi veran justican superregistaran kortumon. En multaj landoj hodiaŭ juristaj asocioj provas krei favoran klimaton favore al la internacia juro. Ili ofte kontraŭstaras la ŝovinismon de la propra nacia registaro.

A.- Inter la du mondmilitoj la juristoj bojis kun la registaroj kontraŭ Internacia Justica Kortumo. Hodiaŭ la registaroj estas ĉiam pli solaj en sia kontraŭbojado.

Cl.- Duan temon pritraktis tiu laborkunsido. Sinjoro André Philip, franca eksministro kaj eksdelegito ĉe UN, raportis pri la kreo far UN de nova organizaĵo okupiĝanta pri la internacia komerco kaj ekonomia kreskado. Eble kelkaj fidelaj geaŭdantoj memoras, ke antaŭ du jaroj ni jam raportis pri la Konferenco pri Internacia Komerco okazinta en Ĝenevo kaj savita pro la nelacigebla kuraĝo de sinjoro Raoul Prebisch. Hodiaŭ ni tuŝos tiun temon nur por citi eron el raporto de sinjoro Philip, kiu humure priskribas la atmosferon, kiu regas en similaj internaciaj konferencoj. Aŭdu lin:

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 5-a parto
Claude Gacond, 145-a radioprelego, 1966.07.13 & 1966.07.16

A.- *« Ni devis aŭdi 110 ministrajn paroladojn, kiuj foje sin kontraŭis kaj plej ofte sin ripetadis. Poste ni laboradis en komisionoj. En ĉiu el ili necesis prononci unu kaj aŭskulti 109 principajn deklarojn. Tekstoj estis poste ellaboritaj, diskutitaj, adoptitaj en tiuj komisionoj per ĉiam 90 voĉoj kontraŭ 20. La 90, kiuj volis ricevi monon, voĉis por la subvencioj, dum la 20, kiuj ne volis doni monon, voĉis kontraŭ. Tial la voĉdonoj nenion signifis. Je iu momento ni timis pri la malpozitiva konsekvenco de la konferenca fiasko. La prezidanto tiam decidiĝis mem prezenti proponojn. Li rikoltis la vidpunktojn de individuoj elektitaj el la delegaciestroj kaj for de iliaj kunlaborantoj. Ĉiuj diskutis propra-iniciate. Post tia oktaga diskutado li atingis kompromison. Li verkis rezoluciaron, kiun unuanime akceptis la konferenco. »*

Cl.- Sinjoro Philip ankaŭ donas sian opinion pri la sekretariatoj de la internaciaj organizaĵoj. Ni denove citu lin : *« La sekretariato estu kiel eble plej malpeza, ol eblas. Nenio pli nocas por internacia organizaĵo, ol vasta sekretariato, ĉar oni ne povas alvoki la plej kapablajn funkciulojn ; oni estas devigata akcepti kandidatojn, kiuj estas prezentitaj de la diversaj landoj respektante iun ekvilibron. Tiuj kandidatoj ne estas elektataj pro sia kompetenteco, sed pro influoj trudataj de la diversaj registaroj. »*

A.- Tiuj du pesimismaj diroj certe maskas la spiritostaton de sinjoro Philip. Li ne estas bojanto kontraŭ la naskiĝanta supernaciismo. Kontraŭe lia raporto pri ekformo de mondaj komercaj juraj kutimoj estas entuziasma. Se li nigr-humure kritikas la interregistarajn morojn, tio estas por instigi siajn kolegojn venki iun naciisman spiritostaton, kiu malhelpas la laboron de la internaciaj organizaĵoj.

Cl.- Siatempe moralistoj kritikis siajn naciajn morojn. La mondo nun atendas pentristojn de la internaciaj moroj. Jen temo por la esperantaj verkistoj.

A.- Pri la aliaj kunsidoj en la Nica Kolokvo ni raportos dum la venontaj elsendoj.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-